

## Herzliche Glückwünsche

Martin Schäffer, der Generalsekretär des Deutschen Esperanto-Bundes hat



Martin Schäffer mit seiner Frau Mallely, seiner Mutter (rechts) und der Mutter von Mallely.

am 20. März 2007 in Mérida, Yucatán, Mexiko, Mallely Martinez Mateos geheiratet. *Esperanto aktuell* gratuliert den Neuvermählten ganz herzlich.

*Alfred Schubert*

Mi certe parolas en ĉies nomo, se mi nome de Germana Esperanto-Asocio kore gratulas al vi kaj al via edzino. Ĉion bonan kaj la realiĝon de ĉiuj viaj deziroj por via estonto!

*Rudolf Fischer*

## Esperanto ĉe „Nepal-Tag“

Laŭ iniciato de Lars Sözüer, la komisiito pri rondvojaĝoj de eksterlandaj prelegantoj, Barat Kumar Ghimire el Nepalo, kiu rondvojaĝis post sia partopreno de PSI tra Germanio kaj prelegis pri sia lando en multaj kluboj, partoprenis la “Nepal-Tag” de la Germana-Nepala Societo (Deutsch-Nepalische-Gesellschaft DNG) en „Gustav-Stresemann-Institut“ en Bonn.

Lin akompanis por interpreti kaj varbi por nia afero Lars Sözüer kaj Wolfgang Bohr. La triopo disdonis pli ol 100 varbilojn al la proksimume 200 partoprenantoj de tiu DNG-kongreso. Bharat,

Lars kaj Wolfgang respondis multajn demandojn pri Esperanto kaj la ĉeesto de Bharat en Germanio en la germana, angla kaj nepala lingvoj. Ankaŭ la ambasadoro de la reĝlando Nepalo, sinjoro Madan Kumar Bhattarai kaj sia edzino interesiĝis pri Esperanto kaj GEA. Ili dufoje parolis kun la triopo kaj invitis ilin al la Nepala ambasadejo en Berlino. Por la kunveno Bharat kaj Lars preparis multkoloran germanlingvan faldfolion pri “Esperanto in Nepal”, kiu trovis grandan eĥon inter la partoprenantoj. La ĉeestintaj esperantistoj estas konvinkitaj, ke GEA devas kapti similajn eventojn por persone prezen-



Dum la Nepal-Tago: La ambasadoro de Nepalo Madan Kumar Bhattarai (maldekstre) en interparolo kun Bharat Kumar Ghimire (2a de maldekstre). Dekstre la edzino de la ambasadoro. Foto: Wolfgang Bohr

ti nian gravan laboron por internacia interkompreniĝo. GEA devas danki al la “Elisabeth-Klünder-fondaĵo”, kiu grandparte financis la vojaĝon de Bharat al Germanio.

*Wolfgang Bohr*

## Himalaja renkontiĝo

Kutime la Internacia Himalaja renkontiĝo, al kiu la Nepala Esperanto-Asocio invitas, okazas ĉiun duan jaron, sed pro la venontjara Azia Kongreso en Bharato 2008 jam okazis post unu jaro denove, de la 26a de februaro ĝis la 11a de marto. Partoprenis 14 japanoj, 14 nepalanoj, inter ili 7 gejunuloj, unu aŭstralianino kaj 3 el Germanio. Krome 3 ĉiĉeronoj el la etnio de la Tamang popolo.

Ni montgrimpis laŭlonge de la Tamang vojoj. Tamang nomiĝas la etnio kiu vivas en la nordo, proksime al la tibeta landlimo kaj kiu iam enmigris el Tibeto al Nepalo. La Tamang popolo havas sian propran lingvon, estas budhistoj kaj iliaj kutimoj similas al la tibetaj. En tiu regiono ankoraŭ ne ekzistas hoteloj, do, ni manĝis kaj tranoktis en



Partoprenantoj de la Himalaja Renkontiĝo de Nepala Esperanto-Asocio.

la domoj de la vilaĝanoj. Estis belega sperto sidi vespere en la domoj de la vilaĝanoj, apud la fajro en la kuirejo kaj iomete ekkoni iliajn vivmanierojn. Ni tramigris plurajn vilaĝojn, multspecajn pejzaĝojn, vizitis varmegajn fontojn. Sur la plej alta pinto ni unu tagon ĝuis belegan panoramon kaj havis eĉ iom da neĝo. Post la montgrimpado ni ĝuis sunleviĝon sur panorama pinto.

Post la montgrimpado okazis programo en Katmanduo. Finfine s-ro Hori el Japanio, prezidanto de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado) kaj s-ino Franziska Toubale el Aŭstralio vojaĝis kun unu juna partoprenanto al la orienta parto de Nepalo por instrui tie dum unu semajno Esperanton al komencantoj kaj progresantoj.

Mi nun estis la 3an fojon en Nepalo kaj ĉiuforte spertis alian flankon de la lando, ĉar vivas multaj etnioj tie. Ĉiam la homoj estas ege ĝentilaj kaj gastamaj. Do, pripensu, ĉu vi ne ŝatus partopreni venontfoje. Ne nur partoprenas junaj, sportemaj esperantistoj. Kaj pripensu ke la homoj en Nepalo ne facile povas vojaĝi eksterlanden. Tial necesas, ke Esperantistoj foje vizitas la landon por motivi ilin.

*Ursula Kölsch  
estu.bonvena@web.de*